Oni povas aldoni sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au

# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**



**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale**

**PLENUMITA 09/09/2021 Kvincentkvardeksepa eldono (unua eldono 20/09/2011)**



## Subtenu vian Novaĵleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

**Uzindaj ligoj** reta-vortaro Freelang Vortaro Plena Ilustrita Vortaro Duolingo Google Translate Pasintaj AE eldonoj duolingo entute lingvohelpilo Esperanta Retradio Esperanta himno PMEGramatiko openclipart.

************************************************************

*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917*



## EKSTRAĴOJ ĈE LECIONOJ EN LA "THE ESPERANTO-TEACHER"

(de Mason Stuttard). N.ro 51 de "Por Komencantoj".

GRAMATIKAJ KVIZETOJ: Respondu al la jenaj gramatikaj demandoj:

1). A). Du tutaj frazoj (aŭ propozicioj) povas kombinati ĝis unu propozicio. Kiom da gramatikaj subjektoj estas en tia propozicio?

B). Kiom da konjunkcioj oni bezonas por kombini tri frazojn ĝis unu propozicio?

C). Konjunkcioj povas kombini ankaŭ du aŭ tri samajn frazpartojn, ekz. "La patrino SED ne la patro iros kun la infanoj al la parko". Kiom da gramatikaj subjektoj estas en tia frazo kaj kiom da predikatoj (verboj)?

Ĉ). Konjunkcio ankaŭ povas kombini du samspecajn vortojn, ekz. "Mi ricevis BELAJN KAJ BONODORAJN multekostajn florojn el de mia filino". Kiun substantivon difinas la tri adjektivoj "belajn" kaj "bonodorajn" kaj "multekostajn", kaj kiuj adjektivoj estas kombinitaj per konjunkcio(j), kaj kiu speco de frazparto estas la substantivo kun siaj adjektivoj?

2). La kvar unuaj linioj de la tria (lasta) strofo de la kanto "La Espero" tekstas jene: "Sur neŭtrala lingva fundamento kolektiĝas pacaj batalantoj kaj rapide kreskas la afero per laboro de la esperantoj.".

*Marcel L*

Kiujn du vortojn aŭ frazpartojn aŭ frazojn kombinas ĉi tie la konjunkcio "kaj"?

Vi trovos la solvojn de la kvizetoj ĉe la fino de ĉi tiu gazeto A.E. numero 547.

Notu ke la demandoj ne plu estas facilaj kaj ke do vi ne plu estas "Komencanto". Gratulojn!

************************************************************

## " Kiel oni fariĝas ekskomencanto."

La kurso kiu instruas kiel legi, aŭskulti kaj revizii ĉiun tagan Esperanton - Duolingo

************************************************************

*Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE*

Oni povas aldoni sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au

## Entute 815,000 lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo

Nun studas **281,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)
Nun studas **227,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)
Nun studas **202,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)
Nun studas **105,000** lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020 )
Nun preparas Esperantan programon por ĉinoj. (Ekde januaro 2022)



## La Esperanta Retradio donas bonan ĉirkaŭ-5-minutan aŭskultadon/legadon ĉiun tagon.



Esperanta Retradio

Kial ni pensas de maldekstre dekstren? 2a sept 2021

## Surhavu vizaĝmaskon.



**Unu terno povas elŝpruci virusojn ĝis 8 metroj.**

**Homoj protektas aliulojn per la surporto de vizaĝmaskoj.**

Nun oni kredas ke aeraj gutetoj estas la ĉefa maniero, per kiu homoj infektiĝas je la koronaviruso. Do portu maskojn. *Roger Springer*

**Artikoloj por AE.** Se vi trovas taŭgan artikolon por AE kaj ne fidas vian Esperantan nivelon, vi povas uzi la aŭtomatan tradukilon de Guglo kaj sendi ĝin rekte al AE *Roger Springer*

**Forĵetu viajn vortarojn *Google Translate*** estas bonega tradukilo de vortoj anstataŭ uzi aliajn vortarojn. Metu la ligon sur vian ekranon.

**3ZZZ** La temoj de la elsendo de la 6a de septembro 2021 estas sano - dormoparalizo kaj sperto de Naomi Osaka-, movadaj informoj - la seminario Amo kaj dek jaroj kiel redaktoro de la revuo Kontakto -kaj personaj spertoj - emo ŝpini kaj teksi,



*Franciska Toubale*

**Nur la Ĉefministro havas la rajton decidi fari militon aŭ ne**. Ne la parlamento

## PM Gough Whitlam hejmigis niajn militanojn el Vietnamujo

sen la permeso de Usono, do li perdis sian postenon neatendite.

The forgotten coup - how America and Britain crushed the government of their 'ally', Australia (johnpilger.com)

Estas grava ke Aŭstralianoj sciu ke Aŭstralio povus militi aŭ ne, laŭ la kuraĝo de Ĉefministro.

*Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE*

Oni povas aldoni sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au

**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj“ korektitaj atingeblas je la suba adreso**

Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo

Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)

# Universala baza enspezo (UBI)



**Por pli kontentiga kaj sekura mondo**

**Ĝi helpus monon flui tra nia ekomonia sistemo sen senutila laboro**

**Ekonomioj funkcias per la fluo de mono.**

**Universala Baza Enspezo ebligas ĉiujn havi monon por helpi la fluon de mono.**

# Venkantoj kaj malvenkantoj

18 monatojn post komencado de diplomatiaj problemoj kun Ĉinujo, Aŭstralio perdas la merkaton de frosta karno kaj karbo de Ĉinujo al sia "aliancano" Usono




Kelkaj aliaj orkidoj floras nuntempe. Amike Petro Danzer





**SOLVO DE LA KVIZETO 51** *(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917*



1). A). 2.

B). 2 konjunkciojn.

C). 2 subjektoj kaj unu predikato.

Ĉ). La tri adjektivoj difinas la substantivon “florojn”. La adjektivoj “belajn” kaj bonodorajn” estas kombinitaj per la konjunkcio “kaj”, kaj tiu substantivo ĉi tie estas gramatika objekto.

2). La konjunkcio “kaj” kombinas ĉi tie du frazpartojn nome liniojn unu plus du kaj liniojn tri plus kvar.


*Marcel Leereveld.*

# LA ORIGINO DE ĈIUTAGA ESPRIMO -

En Anglio, fruatempe, la pano estis dividita laŭ rango. Laboristoj ricevis la bruligitan bazon, la familio la mezon, kaj la gastoj kaj eminentuloj la supran kruston - anglalingve, *the upper crust,* kiu esprimo signifas la socian kremon... aŭ eliton :-).

*Vera Payne*





*Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE*

Oni povas aldoni sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au

(*Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917*



# G r a n d a g r a m a t i k a s e r ĉ o .

## PROFUNDAJN KONDOLENCOJN AL LA FAMILIO DE HAZEL GREEN.



Mi konis Hazel jam antaŭ pluraj jardekoj en la fina parto de la antaŭa jarcento, precipe kiam mi estis prezidanto aŭ vicprezidanto de A.E.A., ĉar ŝi estis tre aktiva en la organizado de A.E.A.-kongresoj kaj en kvinslandaj kunvenoj. Kiam mi enkondukis la novstilajn aŭstraliajn ekzamenojn, ŝi multe helpis en sia ŝtato. Malgraŭ ke ŝi estis tro modesta por antaŭigi sin inter la aŭstraliajn gramatikajn eminentulojn de sia epoko, ŝi estis la laste vivanta de la epoko de tiuj granduloj. Ŝia kompreno de la gramatiko de Esperanto estis fortega. Ŝia loko devis esti en la Ekzamena Komitato de A.E.A., sed ŝi preferis utili en Reĝinlando. Kaj ankaŭ ŝia instrukapablo estis bonega. *Marcel Leereveld.*

## DONALD ROGERS REE MULTE UTILAS AL NI. EKZAMENANTE POR NI LA ORIGINALAJN REGULOJN DE LA ESPERANTA GRAMATIKO,

### ĈIFOJE PRI LA MODAJ HELPVERBOJ.

Ni estu dankaj al li pro tiu vasta informado kaj klarigado.

Mi ŝatus fari al li kelkajn demandojn, precipe pri liaj akceptoj aŭ ne de informadaj vidpunktoj, sed mi ne kuraĝas preni pli de lia tempo post lia ĵusa longa artikolo. Sed li bone konvinkis min ke, ĉar gramatika objekto havas la karakteron de substantivo, oni ne povas diri "Mi povas aŭ mi devas venon", "povi kaj devi" estas netransitivaj verboj, kaj ke tial ankaŭ "voli" estas netransitiva verbo kaj ke, se oni diras "mi volas pomon" tio ĉiam estas mallongigo de "Mi volas havi pomon" kaj ke tial nature ankaŭ "voli" estas netransitiva helpverbo. Se oni ne volas akcepti tion, ĉar oni povas diri "Mi volas ke li foriru", oni devas konkludi ke "voli" estas ordinara transitiva verbo kaj ne helpverbo. Mi lernis tion el de la serĉado de Donald. Dankon!

Samtempe sed tute aliteme mi ŝatus informi la Esperantistaron pri mia maltrankvilo pri la publika diskutado pri diversaj opinioj pri la gramatiko de Esperanto. Ja la akceptado ate de nacioj ante al la plena Esperanto dependos grandparte de la senerareco de nia lingvo. Se eĉ ni, la centprocentaj Esperantistoj, havas malsamajn komprenojn pri la gramatikaj reguloj de Esperanto, tiu nia lingvo ne povas esti fidebla. La mondo, aŭ parto de la mondo, ne povas kaj ne volas akcepti tian Esperanton. Kaj samopinii pri ĉiuj reguloj estas ebla, kiel mi montris dum mia vivo. Nur tiam la mondo povos senhezite kaj tute fidante akcepti Esperanton. Se iu el ni, pro miskompreno, havas alian opinion pri iu gramatikaĵo ol la aliuloj, ni ĉiuj devas konvinki lin ŝanĝi sian opinion, sed ni faru tion nepublike. Tio eblas, se ni ĉiuj bonvolos. Sed en tiaj kazoj ni ĉiuj devas esti honestaj, kaj pretaj korekti nin mem. Kiel mi ofte montris, perfekteco eblas en Esperanto, se ni volas. Kaj tio estos la nura kazo, kiam la mondo akceptos Esperanton. Kaj tio dependos de niaj racio kaj honesteco. Kompreneble esceptoj devas okazi se la naturo postulas tion, ekz. "sur la ponto" ne povas (logike) fariĝi "pontsura" ĉar prepozicioj estas ĉe la fino de vortoj tro mallongaj por komprenati kaj do fariĝas "surponta". *Marcel Leereveld.*

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***